FN PER ANC 47

# Normanda Esperanto Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL. TRIMONATA BULTENO. N° 3

--- Aprilo 1968 ---

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Redaktas:** S-ino J. VINCENT. Rue des Oiseaux -27 - LES ANDELYS

**Sendu la materialon por la bulteno antaŭ la 15-a de marto, 15-a de junio, 15-a de septembro kaj 15-a de decembro.**

==================================================================

ENHAVO:

Paĝoj: 1: Invito al Domfront
2: Vivo de la grupoj
3: Generala kunveno de la Normanda Federacio
Diversaj informoj
4: Paĝo de la infanoj
Kotiztabelo

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## INVITO AL DOMFRONT.

PENTEKOSTO 1968.

1/2-an de junio 1968.

Por la sesa fojo okazos Ĉijare Folklora Festivalo en Domfront. Partoprenos germana grupo, inter ili 3 gesamideanoj, kaj grupo el Zaragoza.

Ĉar la gvidanto de la folklora grupo estas tre favora al la Internacia Lingvo Esperanto, estus tre dezirinde, ke kiel eble plej multe da normandaj gesamideanoj partoprenu tiun festivalon en la Pentekostaj tagoj kaj aranĝu tie kvazaŭan "kongreseton". Tiu invito kompreneble ne limiĝas al la normandoj; ĝi celas ankaŭ viajn geamikojn el la tuta mondo!

Por ricevi detalajn informojn, bonvolu skribi al S-ro G.Véron 5, place Petite Bruyère 61-Domfront. Bonvolu aldoni afrankitan koverton

## VIVO DE LA GRUPOJ.

CLEON. La 15-an de majo okazos Esperanto-vesperokun elmontrado de Esperanto-filmoj.

LES ANDELYS. La jara ĝenerala kunveno de la Zamenhofa Kulturcentro pri internacia amikiĝo malfermiĝis sabaton, la 3-an de februaro je la 18-a horo en la urbdomo, sub la prezidado de S-ro Graffin. Post silenta minuto omaĝe al S-ro Delarue, membro bonfaranto, ĵus forpasinta, la ĉeestantoj pritraktis la tagordon: la morala raporto, prezentita de S-ino Vincent, kaj la financa raporto, prezentita de S-ro Graffin, estis unuanime aprobitaj. Memoriginte la diversajn aktivaĵojn de la Kulturcentro en 1967(Esperanto kursoj, akcepto de eksterlandanoj, prelegoj, vojaĝoj al Hispanujo, Nederlando kaj Grésillon), oni prezentis la projektojn por 1968, inter aliaj komunan vojaĝon al la 4-a internacia arta festivalo en Madrid en aŭgusto kaj la starigon de tradukservo por helpi la lokan turismon. Post renovigo de triono de la komitato, la estraro por la jaro 1968 konsistas el: S-ino Vincent, prezidantino; S-inoj Blanchard kaj Bonnet, vicprezidantinoj; F-ino Bonnet kaj S-ro Rouen, sekretarioj; S-roj Graffin kaj Monnier, kasistoj; F-inoj Robin kaj Graffin, membroj.

La 2-an de februaro malfermiĝis en la knabina lernejo Esperanto kurso laŭ la Cseh-metodo: 5 gesinjoroj ĝin ĉeestas regule marde kaj ĵaŭde vespere.

Ekzamensesio okazos en la knabina lernejo la 16-an de majo je la 14-a horo.(Atesto pri Lernado, Atesto pri Supera Lernado).

15-an de junio je la 20.30: disdono de la premioj en la urbdomo kun varietea vespero.

16-an de junio posttagmeze: subĉielaj ludoj en la publika ĝardeno. Venu multnombre!

LISIEUX. La simpatia tradicio de la "Reĝaj kukoj" ebligis al la Lekzoviaj gesamideanoj agrablan ĉirkaŭtablan kunsidadon.

Ĝi okazis la 22-an de januaro, en la Domo de la Junularo kaj Kulturo, post la ĉiusemajnaj kursoj kun dekkvino da partoprenantoj. La disdono de la partoj disvolviĝis laŭregule: nia prezidantino, S-ino Rault, proponis, ke la plej juna lernantino, Marie-Anne Longuet, nerigardante la ĉeestantojn, voku la ricevontojn. Baldaŭ kronoj ornamis la verton de unuvesperaj gereĝoj.

Sekvis diversaj societludoj, vortludoj kaj aliaj mensakrigiloj, punkciitaj per ekridoj, kiuj ŝprucis tie kaj tie.

Unuvorte, varmiga kaj ĝojoplena etoso ĉirkaŭis niajn efemerajn gesuverenojn!..

C. MARTIN.

ROUEN-a regiono. Kurso funkcias en Sotteville. Detaloj mankas.

RIMARKO: La grupestroj estas petataj sendi la informojn pri sia agado komence de la monato antaŭ la apero de la bulteno. Dankon.

&+&+&+&+&

GENERALA KUNVENO DE LA NORMANDA FEDERACIO DE LA
ESPERANTO KULTURCENTROJ.

La 11-an de februaro 1968, je la 14-a horo, okazis en Lisieux, en la Junuldomo, la unua ĝenerala kunveno de la Normanda Federacio de la Esperanto Kulturcentroj, por diskuti la statutojn kaj elekti la estraron.

Nome de la lokaj esperantistoj, S-ino Rault bonvenigis la ĉeestantojn kaj malfermis la kunvenon, en kiu partoprenis aŭ estis reprezentitaj trideko da gesamideanoj.

S-ino Vincent legis la statutojn, artikolon post artikolo. Post la legado de ĉiu artikolo, la ĉeestantoj pridiskutis ĝin kaj voĉdonis. Fine, la statutoj estis unuanime aprobitaj. Tiam la kunveno decidis sendi dankon al S-ro Rougetet, kiu kontrolis la tekston de la statutoj kaj faris utilajn sugestojn.

Poste oni voĉdonis por elekti la 6 membrojn de la estraro. La diversaj kandidatoj ricevis la jenajn nombrojn da voĉoj:

F-ino Beaudouin: 15; F-ino Bonnet: 8; S-ro Jouis: 26 (elektita) S-ino Lavallée: 23 (elektita); S-ro Leconte: 24 (elektita); S-ino Lucas: 13; S-ro Pottier: 25 (elektita); S-ino Rocques: 18 (elektita); S-ino Vincent: 22 (elektita).

Post diskutado inter la elektitoj, la estraro konsistas el:

Prezidanto: S-ro JOUIS
Vicprezidantino: S-ino LAVALLEE
Sekretario: S-ro POTTIER
Kasistino: S-ino VINCENT
Membroj: S-ro LECONTE, S-ino ROCQUES°

S-ro Jouis prezentis la estraron al la ĉeestantaro.

La estraro komisiis S-inon Lavallée por reprezenti la Federacion en la Nacia Kongreso en Aix-en-Provence.

S-ro Jouis proponis du eblajn datojn por la ekzamenoj en Sotteville-lès-Rouen: 15-an de majo aŭ 9-an de junio posttagmeze, en la lernejo Ernest Renan (Atesto pri Lernado kaj eventuale Atesto pri Supera Lernado). La interesuloj bonvolu sin turni al S-ro Senet por scii la definitivan daton.

S-ino Vincent donis informojn pri la karavano al Madrid.

S-ro Jouis fermis la kunvenon je la 16.30.

° Pro diversaj kialoj, S-ino Rocques rezignis pri sia posteno; anstataŭas ŝin F-ino Beaudouin, kiu ricevis sufiĉe da voĉoj por esti elektita.

°0°0°0°0°

DIVERSAJ INFORMOJ.

Deziras korespondi: S-ino Vera Fronkova PARDUBICE
Okruzni 678 ĈEĤOSLOVAKUJO

Tria kongreso de la studenta tutmonda esperantista ligo (STELO): Aix-en-Provence 13-20-an de aŭgusto 1968. Informoj ĉe Studenta Esperantista Rondo 28, rue Portalis 13-Aix-en-Provence.

## PAĜO DE LA INFANOJ.

Per tiu paĝo, ni celas helpi al la gepatroj, kiuj instruas Esperanton al siaj idoj ekde la naskiĝo, trovi taŭgan materialon por ili. Estos bonvenaj ludoj, ŝaradoj, enigmoj, kantoj kun muziknotoj k.t.p.

Ni ankaŭ malfermas konkurson malpermesitan al la pli ol 15-jaruloj. La gajninto ricevos belan surprizon. Se troviĝos pluraj gajnintoj, la surprizo estos lotumita inter ili.

Unua problemo (5 poentoj):

Kun P, mi ne estas agrabla; kun L, mi lumas en la nokto; kun D, mi estas alta kaj mola; kun S, mi lumas en la tago;kun N, mi ekzistas hodiaŭ.

Dua problemo (5 poentoj):

```
    x
  x x x
x x x x x
  x x x
    x
```

Anstataŭu la krucojn per vortoj laŭ la jenaj difinoj.
La vortoj estas la samaj horizontale kaj vertikale.
1. Litero.- 2. Valora metalo.- 3. Per ĝi, oni konstruas.
4.- Numerala adjektivo.- 5. Litero.

Sendu viajn solvojn al S-ino Vincent rue des Oiseaux 27-Les Andelys, antaŭ la 30-a de aprilo. Indiku viajn nomon, adreson kaj naskiĝdaton. La solvoj, kiuj ne entenos tiujn indikojn aŭ kiuj alvenos post la limdato ne estos prikonsideritaj. Atentu!

§%§%§%§%§

## INFANAĴOJ.

Broŝuroj verkitaj kaj ilustritaj de la infanoj. Eldonejo de la Moderna Franca Lernejo CANNES (A-M). Lernejo de Ste Marguerite-de-Queyrières(H-A)

------

## FRANCISKO LA ETA ŜAFISTO.

### FRANCISKO FORLASAS LA LERNEJON.

Hodiaŭ Francisko forlasas la lernejon. Li devas paŝti la ŝafojn. Oni ne povas ilin sendi al l' Oriol; ankoraŭ estas neĝo. Do estas necese ilin konduki al la kampoj ĉirkaŭ la vilaĝo, kie la nova herbo jam kreskas, aŭ sur la deklivojn, kiuj verdiĝas pro la printempa suno.

Pasintjare, Mario paŝtis la ŝafojn de Francisko. Oni devis pagi po kvin frankoj por besto; tio iĝis multekosta!

Ĉijare, Francisko estas sep kaj duon-jara. Estas granda knabo. Li bezonas neniun por paŝti sian ŝafaron la tutan tagon sur la kampoj kaj rekonduki ĝin hejmen en la vespero.

( daŭrigota)

====================

## KOTIZTABELO.

Union des Espérantistes de Normandie . . . . . . . . . . . . . . . 2 F
Kasisto: S-ro E. Jouis p.ĉ.k. Rouen 283-40 E

U.F.E.(kun "Revue Française) . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .20 F
U.E.A.(kun "Esperanto" kaj Jarlibro . . . . . . . . . . . . . . . 35 F
Kasistino: S-ino J. Vincent p.ĉ.k; Rouen 574-88 M

Vi multe helpas la kasistojn...kaj vin mem pagante frue viajn kotizojn. Kontrolu ĉu vi ne forgesis! Dankon.

Dépôt légal: 2ème trimestre 1968.

Polycopié par le Centre Culturel et d' Amitié Internationale Zamenhof 27-Les Andelys.

La gérante: Mme J. Vincent.